

AVENO 38 , 2012 - Homaj Rajtoj tutmonde

Ligoj:

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/>

Tutmondaj Mondcivitanaĵaj Teritorioj: <http://www.recim.org/dem/tcm-list.htm>

Medico International: helpas al homoj kiuj troviĝas en la ardantaj fokusoĵoj de regionaj militoj kaj lezoj de la Homaj Rajtoj. Ligoj al partneraj organizaĵoj en multaj landoj: (de, en, es) <http://www.medico.de>

Israelo & Palestino

2012-11-29 Statuso de Palestino kiel Observanto en la UN decidita.

Gratulon al la palestina popolo en ambau partoj de la lando! Bona komenco.

Komento de AVE/mw:

Sed nun venas la penoj agi respondece kiel ŝtato, zorgi ke la ekstremistoj komprenas ke ili devas agnoski la viv-rajton de Israelo en la teritorio difinita 1967. *

Atentu: se ekstremistoj en Gaza jhetas rakedojn al Israelo, tiam nun ankaŭ la Okcidenta Bordo estas kun-kulpa. Tion mi audis de iu komento de israela ĵurnalisto - kaj mi ne dubas, ke tiu averto gravas.

Aliflanke - estas neakceptebla, ke Israelo tuj poste deklaris la konstruadon de pliaj 3000 novaj loghejoj en la okupita tereno, por finfine enfermi Jerusalemon, kiu estas sankta urbo por judoj kaj islamanoj.

Komentoj pri la Gheneva Deklaro (vidu pli sube) kaj la peto subteni tiun deziritan statuson "observanto":

Palestino ghis tiu decido estis Observanta Organizo: OLP. Palestino vendrede farighis Observanta Ŝtato je UN. Palestino ankoraŭ ne estas membro-ŝtato de UN. (dankon por la klarigo al Mirejo)

Roy demandas chu/kiel la temo rilatas al Verdismo - kaj prezentas la vidpunkton de la usona Verda Partio: La Verda Partio en Usono ja prenas starpunkton rilate la israela-palestinan konflikton, sed ghi estas (samkiel la nuna mia) kontraŭa al tiu de la AVAAZ-petskribo. Vidu la partian platformon (tradukita de Roy) che <http://www.gp.org/committees/platform/2012/Platform-2012.html> kaj specife D.2.i

"Ni agnoskas, ke internacia opinio estas dedichita al du-ŝtata solvo por la israela-palestina konflikto.

Tamen, ni vidas la du-ŝtatan solvon kiel nek demokratia nek farebla fronte al internacia juro, materialoj kondiĉoj kaj 'surgrundaj faktoj' kiuj nun ekzistas en Israelo kaj la okupataj palestinaj teritorioj. Kun tiu chi realaĵo, ni apogas usonan eksterlandan politikon kiu antaŭenigu la kreon de unu sekulara, demokratia ŝtato por palestinanoj kaj israelanoj en la lando inter la Mediteraneo kaj la rivero Jordano, la nacia hejmo de ambau popoloj, kun Jerusalemo kiel ĉefurbo. Ni kuraghigas novan usonan diplomatian iniciaton por komenci la longan procezon de intertraktado, metonta la bazon por tia simpla unu-ŝtata konsisto."

Gheneva Iniciativo (2003) - "Propono je akordo pri la finfina statuso de Israelo kaj Palestino"

<http://www.genfer-initiative.de/>

Grupo da israelaj kaj palestinaj personoj verkis dum dujara kun-laboro tiun proponon, kiu estis subskribita je la 1-a de Decembro 2003 - supozeble en Ghenevo. La ĉefa interkonsento estis:

- Israelo agnoskas sendependan ŝtaton Palestino, kaj garantias liberan kaj ĉiam malfermitan koridoron inter la du partoj de Palestino: Gaza-Strio kaj Okcidenta Bordo.
- Palestino agnoskas la sendependan ŝtaton Israelo en la limoj, kiuj estis deklaritaj 1967 en Oslo.
- Israelo retiras la setlantojn el tiuj regionoj, laŭ difinita tempo-plano.
- La rifughintoj ricevos kompenson, kaj rajtas setligi, laŭ diversaj reguloj, tial ili ne plu estos rifughintoj.
- Jerusalemo restos dividata, kaj estos la ĉefurbo de ambau ŝtatoj. Kelkaj sanktaj lokoj ricevos internacian statuson.

2012-11 Palestino - diversaj artikoloj pri "La alia flanko" rilate la konfliktojn inter Palestino kaj Israelo.

(plejparte en la germana): <http://othersite.org/about/>

dank' al d-rino Gabi Weber & Simon Köhl, Freiburg.

Intertempe Palestino deklaris sin ŝtato, estas akceptita de multaj ŝtatoj, sed ankoraŭ ne de UN.

En 2011 la Gaza-Strio kune kun la t.n. Okcidenta Bordo estis akceptita de UNESKO kiel Palestino.

Mahmud Abbas substrekis antaŭ ne-longe ke ili respektos la ekzisto-rajton de la ŝtato Israelo.

2012-02-22 Israelo ne akceptas PV-instalajhojn flanke de palestinaj homoj, en la palestina regiono C kie Israelo regas. Homoj de la juda etno aliflanke ricevas ĉian subtenon.

<http://sonnenseite.kjm4.de/ref.php?id=6316dfa14373ms305>

P.R. Chinio kaj naciaj malplimultoj, aparte tibetanoj

2012-10-03 P.R.China Nacia Tago - Gratulon kaj Bondezirojn ! Bedaurinde ne kunfestas la tibetanoj :(Denove sin membruligis juna tibetano, Yungdrung, en Dzatoe, Amdo (la 52a).

La nova prezidento Xi Jinping devas solvi la defion doni pli da rajtoj al la tibeta popolo, aliflanke ili ne emus kunlabori kun la registaro. Jen internacia pagharo: <http://www.xijinping-tibetchallenge.org>

Vi povas vidi filmeton kaj legi detalan dokumenton je "Open Publication" en la angla, franca kaj china.

2012-12 Pli ol 90 ge-tibetanoj - plejparte junaj - mem-ekflamigis sin ek de marto 2011 - kulminante post la mezo de 2012. Tibeto bezonas nomadan kulturon kaj indighenan budhismon - la Han-kulturo ne konvenas en tiu ekologie tre sentema regiono. La budhismo en Tibeto estas severe kontrolita de la china registaro (cetere ankaŭ la kristana religio en tuta PRCh); la monahhejoj ne estas liberaj en la akceptado de novicoj.

Komunistoj argumentas, ke la china registaro finis la feudismon en Tibeto, sed tian deziron decidu chiu popolo mem - fakte la Dalai Lamao intertempe abdikis de sia (ekzila) regeco, kaj restis nur spirita gvidanto.

<http://www.tibet-initiative.de/de/tibet/menschenrechte/>

(bonvolu subskribi, angle) <http://standupfortibet.org/pledge/>

Tibetanoj kaj iliaj subtenantoj pledas por (koncizigite de AVE):

- * Retiri la soldatojn el monahhejoj kaj publikaj placoj.
- * Liberigi chiujn politik-kauze malliberigitojn, kiuj pace protestis.
- * Ne plu subpremi la religian kaj kulturan vivon en Tibeto, kaj fini la patriotan eduko-programon.
- * Remeti chiujn kadrulojn de la Komunista Partio el la monahhejoj, kaj ne plu interveni en la elekton de re-inkarnataj lamaoj.
- * Garantii al la tibeta etno la rajton instrui en la propra lingvo en la lernejoj.
- * Haltigi la ekonomian evoluigon laŭ la han-china modelo, kiu malbonigas la situacion de la tibetanoj.
- * Haltigi chiujn subtenojn por han-ĉinoj rilate ilian ek-loghon en Tibeto.
- * Fini la fiksan lokigon por nomadoj, kaj ebligi al ili reveni al ilia tereno, kaj ilian vojon vivi.

(kompleta teksto, angle - kun google-tradukoj) <http://www.tibetnetwork.org/JointStatement30October2012>

2012-11-23 : Haltigu la perfortan setligadon en Tibeto !

Transdono de postuloj - fronte je la ambasadejo de PR Chinio - al la koncernulo pri Homaj Rajtoj de la germana parlamento , M.Loening (FDP), kiu transdonos ĝhin al la Ministro pri Eksteraj Rilatoj, Westerwelle. Chu li havos la eblecon paroli pri tio kun sia china kolego - tion ni esperas.

Jen informo kaj filmeto pri medio-konferenco rilate Tibeto (subtitoligita: de, en, cn)

http://www.tibet-initiative.de/de/aktionen/aktionen_kampagnen/tid_umweltkampagne_greentibetfreetibet/

La china registaro planas haltigi nomadismon, kiu estas la natur-konvena maniero uzi la grandan herbejon en Tibeto. Avertu: Jam nun en Tibeto montrighas granda klimato-shanghigho - ankaŭ pro la grandskala senarbarigado tie - organizite de la Pekina registaro. Tio havos katastrofan influon al la akvo-provizo de duona Azio, inkluzive de PR Chinio. Unue venos tro multe da akvo pro rapidigita fandighado de la glacheroj - kaj pli poste kaj daŭre multo multe.

AVENO informis plurfoje pri la ekologiaj problemoj setligi nomadojn, shanghi herbejo-pashtadon en agrikulturon kaj forhaki arbarojn: http://www.verduloj.org/38/a38_eko.pdf

Christian Lavarenne kaj Manfred Westermayer verkis detalan artikolon pri la senarbarigo, kiu estis publikigita en TSkT 1996, kaj dank al la ĉinaj esperantistoj ankaŭ tradukita en la ĉinan.

(dulingva teksto: eo & cn) Tutmonda Scienco kaj Tekniko (1996) http://www.verduloj.org/tib_senarba.htm

2012-02-21 **Tibetanoj malliberigitaj** kiuj pilgrimis al Hindio por renkonti Dalai Lamao.

Kaj denove membruligo de budhista monahho en Tibeto. Vera autonomio por la provinco Qinghai dezirata.

Fermita Tibeto: La registaro de P.R.Chinio ne donos vizojn al turistoj por viziti Tibeton dum Marto, ĉar tiam oni festas ne nur la tibetan Printempan Feston, sed ankaŭ rememoras la 86 000 mortitojn dum la insurekcio de 1959, kiu komencis je la 10a de Marto.

Interna Mongolio, ankaŭ tie estas similaj ekologiaj problemoj: agrikulturo ne taugas en tiom seka regiono; kaj ekspluatado da resursoj devas respekti la bonan kvaliton de la akvo-provizo.

Orienta Turkeŝtano, ankaŭ tie han-ĉinoj multighadas , kaj la ujuguroj ighas homoj de dua klaso. Homoj kiuj plendas por vera autonomio, s-ino Khadeer, estas enkarcerigitaj. Protestoj estas batitaj de la milico.

Diversaj landoj

2012-12 **Sirio:** Intertempe Assad ighas pli kaj pli izolita, altranguloj de sia militarofugas eksterlanden, sed daure mortas homoj, kaj multaj devis fughi.

2012-07 La opozicio en Sirio restas sen helpo de la internacia komunumo (UN), ĉar Rusio, ja liveras armilojn al Sirio, sed ne emas perdi la aliancanon; kaj Ĉinio ne volas internacian enmiksighon. Ni preghu, ke Assad kun sia klano baldau demisios, kaj ke tie ne okazos hhaoso, sed pashoj al demokratia registaro.

2012-08 **Vjetnamia registaro ne emas kritikon.**

Ta Phong Tan kritikis la politikon per blogoj en (laudire) afabla maniero, kiel respondeca civitanino. Temis pri la troa elspezado, subteno de kampanoj, kaj shi atentigis pri la problemoj de tro intensa rilaton kun Ĉinio. Pro tio la **blogistino estis kondamnita al 20 jara malliberejo.**

Bonvolu - aparte se vi partoprenis la UK-on - peti la vjetnaman prezidenton liberigi Ta Phong Tan kaj aliajn blogistojn: <http://www.care2.com/go/z/e/AGZXC/zMRG/Bx1er>

2012-09 **Japanio:** Amnestio Internacia postulas la **apelacion pri la mortpunita** Hakamada Iwao. Li estis mort-kondamnita antaŭ 44 jaroj. La pruvoj ne estas klaraj, kaj oni torture elpremis konfesion.

Je la 19a Oktobro justic-korto decidis pri DNA-analizo de pruvajho. Sendepende de ties rezulto: AI kaj AVE kontrauas mort-punon de chia aspekto. Bonvolu subteni la peton de AI al la japana justico-ministro.

<http://www.amnesty.de/hakamada-iwao>

2012-09-13 **Hungario:** eksa chefministro Ferenc Gyurcsány de Hungario malstastrikas kontraŭ nova leĝo de Orban kiu, por fiksi sian potencon kaj praktike ĉesigas la liberajn elektojn, postulas personan antaŭ-registaron kvankam la civitanoj jam trovighas en datumbazo. Vojagho al distrikt-urbo por registrighi estas fakta barado. Tiamaniere Orban reduktos la nombron da voĉdonantoj aparte por la opozicia maldekstra partio, kiun subtenas ofte la pensiularo.

<http://europacivitano.wordpress.com/2012/09/13/malsat-strikas-la-eksa-hungara-cefministro/#more-1358>

2012-10 **Rusio:** Bonvolu subteni peticion abolicii la verdikton kontraŭ 2 anoj de "Pussy Riot", kiuj pro (ja, iomete stranga) pregho al Sankta Maria remeti Putin de la registaro, estis tenitaj sub severaj kondiĉoj duonan jaron dum la proceso kaj krome estis kondamnitaj al du-jara Gulago "Lager" en Siberio.

http://www.care2.com/go/z/e/AG5PI/zM_Y/Bx1er

Bonvolu subskribi la peticion de AI: (en la germana) <http://www.amnesty.de/pussy-riot>

Sur la internacia retejo de AI vi povas trovi la temon se vi serĉas "Pussy Riot": <http://www.amnesty.org>

2012-07 En sia 3-a prezidenteco **Putin batalas kontraŭ chia opozicio.** Kunlaboro kun eksterlandaj CSO-oj estas kalumniata agenteco. La plej aktuala atako estis la ordono al Echo Moskvy transdoni la manuskriptoj de radio-elsendoj kun opoziciaj politikistoj, inter ili Xenia Sobchak, Boris Nemzow k.a.. (parte de ew Bad. Ztg. 2012-08-23, p.6)

Aliflanke la **rusa ekonomio** ne sufiĉe evoluighas; pro tio ne-registaraj parlamentanoj timas senlaborighon pro la nova aligo de Rusio al la Tutmonda Merkato Organizajho (angle, WTO).

(lau cn, ARD, 2012-08-12)

EU: **Lingva situacio de Romaoj en EU**dum EEU konferenco en Irlando. (Prelego de Nikola Rašić (Nederlando): Detala informo pri la situacio de la romaoj trovighas en La Ondo de Esperanto. 2010. №8–9 (190–191). Ghi ankau trovighas sur la retejo de AVE: <http://www.verduloj.org/romaoj.rtf>

Ofte ligitaj kun naturaj katastrofoj estas bataloj kaj malpaco. Pozitiva ekzemplo: la **re-verdigo de Sahelo.** Pri tio trovighas raporto sur nia retejo: http://www.verduloj.org/verdigi_sahelon.rtf

La **Indiana Kooperativa Grupo**, transnacia organizajho en kunlaboraj rilatoj kun Intraespo kaj lanchintoj de Kiberio, decidis adopti Esperanton kiel laborlingvon. La membroj de la Grupo detale informas pri sia decido en la Indiana Kuriero. Ilia chefa argumento: Kiu lingvo povus esti pli bona ol sinteza lingvo por komunumo kiu unuighas pro ideoj kaj projektoj, ne pro originoj, «ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj». Esperanto estas por ni: sinteza lingvo por sinteza komunumo.

www.liberafolio.org/Members/cneidorf23/indiana-kooperativa-grupo-adoptas-esperanton-kiel-laborlingvon (dankon al Germain por la pluensendado)

2012-07 UN akceptas la liberecon esprimi sin en la interreto kiel Homan Rajton.

La samaj rajtoj devas validi kaj ekster la interreto kaj ene de ghi; tiel tekstas aktuala resolucio de la UN-Konsilio por Homaj Rajtoj: <http://www.apc.org/en/node/14772/>

2012-02-11: Katalunoj petas la internacian solidaron de la tuta esperantistaro:

" Estimataj, La urbo Castelldefels, nuntempe regata per dekstrema hispannaciisma partio, **forigis la nomon de la elstara esperantisto Ramón Fernández Jurado** la urba biblioteko.

Kataluna Esperanto-Asocio aliĝis al la civitana kampanjo de la urbanoj de Castelldefels, kaj relanĉis ilian retan proteston dulingve (esperante kaj katalune), por peti la internacian solidaron de la tuta esperantistaro. Ni petas vin, do, legi la sekvan novaĵon en nia retjo kaj uzi la ligilon kiun vi trovos tie por **sendi ret-leteron** la urbestro de Castelldefels, postulante redoni la nomon de la elstara esperantisto Ramón Fernández Jurado al la urba biblioteko. Mi petas diskonigi la proteston. **Koran dankon pro via solidaro.** Amike salutas, Farri "

<http://esperanto.cat/web/Redonu-la-nomon-de-la-esperantisto?lang=eo>

Komento AVE/mw: Samtempe oni legas, ke la jughisto **Baltazar Garzon** estis damnita al 11-jara profesio-malpermeso kaj monpuno; ĉar li mallege subaŭskultis telefonadojn okaze de proceso pri korupcio.

Li estas tiu, kiu metis Pinochet antaŭ jugheoj kaj kiel sola kiu persekutas la krimojn faritaj dum la Franco-diktaturo en Hispanio. Ĉu la justico en Hispanio blindighis nur sur unu okulo ?

2012 Eurovision Kanto-Konkurso en Baku. Bonvolu subteni la peticion de Amnestio Internacia:

Multaj ĵurnalistoj kaj civitanaj aktivuloj estas politikaj malliberuloj en Azerbajdshano. La prezidento garantiis al eksterlandaj ĵurnalistoj por la Eurovision Konkurso opinio-liberecon. AI petas subteni vin ke la registaro liberigu la enlandajn pro kritiko enkarcerigitajn: (de) <http://www.amnesty.de/ESC2012>
(en) <http://www.amnesty.org/en/appeals-for-action/freeazerbaijan>

2012-01-14 Hungario glitas en malliberecan statuson.

Eble la manko da mono povas re-tirigi la ne-demokratian novan konstitucion ?

Unu kauzo estas la shuldoj de la shtato, sed tio ne necesigas tendence fashisman registaron.

2012-01-15 Irano: Bahaanoj daure persekutataj:

La 5an de januaro la kanada ĵurnalo "The Huffington Post" publikigis apelacion de la Prezidantoj de du Kanadaj Universitatoj en Winnipeg kaj Ottawa, por liberigo el karcero de la iranaj docentoj aliĝantaj al kredo Baha'i kaj enkarcerigitaj pro ilia kredo.

Tiu-ĉi persekutado komencis per la Irana atako kontraŭ la bahaa Instituto pri supera instruado (BIHE), naskiĝinta por liveri instruan kurson por bahaaj junuloj ekskluditaj el la universitato. Inter la arestitoj en la pasinta majo menciindas:

- Nooshin Khadem, diplomita ĉe la Carleton Universitato de Ottawa, suferanta 4 jarojn da karcero.

- la geedzoj Kamran Rahimian kaj Faran Hessami, atendantaj verdikton, kiuj plenumis sian esplordoktorecon ĉe la universitato de Ottawa. Ili ambaŭ estas akuzataj instrui sen agnoskitaj kvalifikoj.

La Iranaj aŭtoritatoj konfiskis iliajn diplomojn deklarante ke ili neniam atingis la diplomon.

(en) http://www.huffingtonpost.ca/allan-rock/bahai-iran-politics_b_1186039.html

Certe chiu esperantisto scias ke inter la 12 principoj de la Baha'a kredo estas la

"adopto de iu lingvo universala".

(eo) <http://bahaaeligo.bahai.de/>